



DECEMBRO 1978



5-A JARO

N-ro 3 (15)



FELICAN NOVAN JARON 1979

JANUARO

1 8 15 22 29  
2 9 16 23 30  
3 10 17 24 31  
4 11 18 25  
5 12 19 26  
6 13 20 27  
7 14 21 28

FEBRUARO

5 12 19 26 *Lundo*  
6 13 20 27 *Mardo*  
7 14 21 28 *Merkredo*  
1 8 15 22 *Ĵaŭdo*  
2 9 16 23 *Vendredo*  
3 10 17 24 *Sabato*  
4 11 18 25 *Dimanĉo*

MARTO

5 12 19 26  
6 13 20 27  
7 14 21 28  
1 8 15 22 29  
2 9 16 23 30  
3 10 17 24 31  
4 11 18 25

APRILIO

2 9 16 23 30 *Lundo*  
3 10 17 24 *Mardo*  
4 11 18 25 *Merkredo*  
5 12 19 26 *Ĵaŭdo*  
6 13 20 27 *Vendredo*  
7 14 21 28 *Sabato*  
1 8 15 22 29 *Dimanĉo*

MAJO

7 14 21 28  
1 8 15 22 29  
2 9 16 23 30  
3 10 17 24 31  
4 11 18 25  
5 12 19 26  
6 13 20 27

JUNIO

4 11 18 25 *Lundo*  
5 12 19 26 *Mardo*  
6 13 20 27 *Merkredo*  
7 14 21 28 *Ĵaŭdo*  
1 8 15 22 29 *Vendredo*  
2 9 16 23 30 *Sabato*  
3 10 17 24 *Dimanĉo*

JULIO

2 9 16 23 30 *Lundo*  
3 10 17 24 31 *Mardo*  
4 11 18 25 *Merkredo*  
5 12 19 26 *Ĵaŭdo*  
6 13 20 27 *Vendredo*  
7 14 21 28 *Sabato*  
1 8 15 22 29 *Dimanĉo*

AŬGUSTO

6 13 20 27 *Lundo*  
7 14 21 28 *Mardo*  
1 8 15 22 29 *Merkredo*  
2 9 16 23 30 *Ĵaŭdo*  
3 10 17 24 31 *Vendredo*  
4 11 18 25 *Sabato*  
5 12 19 26 *Dimanĉo*

SEPTEMBRO

3 10 17 24 *Lundo*  
4 11 18 25 *Mardo*  
5 12 19 26 *Merkredo*  
6 13 20 27 *Ĵaŭdo*  
7 14 21 28 *Vendredo*  
1 8 15 22 29 *Sabato*  
2 9 16 23 30 *Dimanĉo*

OKTOBRO

1 8 15 22 29  
2 9 16 23 30  
3 10 17 24 31  
4 11 18 25  
5 12 19 26  
6 13 20 27  
7 14 21 28

NOVEMBRO

5 12 19 26  
6 13 20 27  
7 14 21 28  
1 8 15 22 29  
2 9 16 23 30  
3 10 17 24  
4 11 18 25

DECEMBRO

3 10 17 24 31 *Lundo*  
4 11 18 25 *Mardo*  
5 12 19 26 *Merkredo*  
6 13 20 27 *Ĵaŭdo*  
7 14 21 28 *Vendredo*  
1 8 15 22 29 *Sabato*  
2 9 16 23 30 *Dimanĉo*



Nemzetközi  
eszperantó  
diáklap

Megjelenik  
évente háromszor

V. évfolyam,  
3. szám, 1978

Felelős szerk.:  
Kurucz Géza

Kiadja  
a Magyar  
Eszperantó  
Szövetség  
1081 Budapest,  
Kenyérmező u. 6.

Felelős kiadó:  
Vaskó Tibor

Készült  
a Somogy megyei  
Nyomdaipari  
Vállalat  
kaposvári üzemében  
— 78-7143 — 5000  
példányban

Felelős vezető:  
Farkas Béla igazgató

TASCO  
DE ĈIU  
ESPERANTISTO:  
PROPAGANDI  
LA REVUON  
INTER LA  
KOMENCANTOJ

# Al la JARO de la INFANOJ



*UNESKO deklaris<sup>1</sup> la jaron 1979 „Jaro de la infanoj”. Tiu decido ne estis hazarda<sup>2</sup>. Ne temas nur pri tio, ke la hodiaŭa infanaro estas la morgaŭa labor'ant'aro kaj gvidant'aro de la socio. Tio estas ja eterna problemo<sup>3</sup>.*

*Kvankam ankaŭ tia al-iro estas grava, tamen UNESKO celas ellevi alian krian problemon; problemon, kiu ne estas nur pri-infana, sed kiu minacas ĉefe infanojn.*

*Dum multaj infanoj vivas inter bonaj kondiĉoj, necesaj por sana evoluo; milionoj da et-uloj ne ĝis-vivas la aĝon de tri jaroj, aŭ malsatas konstante, plen'kreskas sen bazaj scioj, suferas je malsanoj, kaj havas ne-hojajn cirkonstancojn<sup>4</sup>.*

*La jaro de la infanoj deziras turni la atenton al tiu brula demando, ĝi volas igi vastajn popolo'amasojn konsciaj pri la graveco de tiu problemo.*

*Ni, esperantistoj, kiuj batalas kontraŭ lingva diskriminacio<sup>5</sup>, rilatas al la for-igo de aliaj diskriminacioj kun plena kompreno, ĉar ili ĉiuj inter-de-pendas. For-igo de iu, el ili, helpas ankaŭ la malaper'igon de la ceteraj.*

1. anoncis publike/ 2. ne-plan'ita; ne-antaŭ-vidita/ 3. grava demando/ 4. kondiĉ'aro/ 5. diferenciga distingo laŭ iu maljusta bazo.


# KIROS KAJ TOMIRIS

(Dua parto)

Laŭ la konsilo de Kroisos, la armeo<sup>1</sup> de Kiros trans-iris la riveron Arekses, kaj en-iris en la landon de Tomiris je unu tago da marŝo-vojo. Poste, la persoj<sup>2</sup> kaj ilia reĝo Kiros re-tir'iĝis kun la plej valoraj militistoj; restis sur-loke nur la malpli valora parto de la persa armeo. Kaj tiam al-venis la triono de la masageta armeo, kies soldatoj facile super-venkis la post-rest'intajn soldatojn de Kiros, kvankam ili kuraĝe defendis sin. Super-venk'inte siajn persajn malamikojn, kaj vid'ante ties al-

logajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, la masagetoj avides<sup>3</sup> ek-manĝis; ili diboĉe<sup>4</sup> regalis sin; post tio, sataj kaj ebriaj, ili en-dormiĝis...

Tiam re-venis la persaj soldatoj. Ili mortigis multajn kontraŭulojn kaj kaptis viv'antaj eĉ pli multajn. Inter la kaptitoj estis ankaŭ Spargapises, filo de Tomiris, la milit'estro de la masagetoj. Kiam la reĝino sciigis pri la sorto de la masageta soldataro kaj de sia filo, ŝi sendis novan mesaĝon al Kiros: „Kiros, vi estas ne-sat'igebla per sango! Ne fieru pri la



venko, ĉar vi venis al ĝi helpe de ferment'inta<sup>5</sup> suko de vin'beroj! Vi kaptis mian filon dank' al via ruzeco, ne per via forto en interbatalo. Sed nun, aŭskultu je miaj paroloj! Mi ja volas por vi nur bonon! Re-donu mian filon al mi, kaj for-lasu ĉi mian teron! Ĉar sciu, ke vi sukcesis superruzi nur la trionon de la masageta militistaro. Se vi ne agos laŭ mia deziro, mi ĵuras per la ben'ita<sup>6</sup> Suno, la dio de la masagetoj, ke mi plene satigos vin per sango, ĉe se vi ŝajnas esti ne-satig'ebla!"

Kiros ne multe atentis pri tiu grava kaj serioza mesaĝo<sup>7</sup>. Kaj Spargapises (la filo de la reĝino Tomiris), kiam li vekigis el sia dormo kaŭz'ita de la ebriiga vino, kaj sciigis pri sia humil'iga<sup>8</sup> situ-

acio<sup>9</sup>, petis la reĝon Kiros, ke oni for-prenu, de li, la katenojn<sup>10</sup>. Kiros konsentis plenumi lian peton. Kaj, kiam liaj manoj estis liberaj, Spargapises mortigis sin. Tiel mortis la filo de la reĝino Tomiris.

Ĉar Kiros malatentis la averton de Tomiris, ŝi kolektis ĉiujn soldatojn de sia rest'inta armeo, kaj atakis la armeon de Kiros. Kred-eble, tiu batalo estis la plej sanga el ĉiuj militoj de la barbaraj<sup>11</sup> popoloj. La malamikaj soldatoj longe vundis kaj mortigis unuj la aliajn, ĉar neniu armeo volis fuĝi<sup>12</sup> ĝis, fine, la masagetoj akiris la definivitan<sup>13</sup> venkon. Granda parto de la persa armeo pereis<sup>14</sup> sur la batal'kampoj; tie mortis ankaŭ Kiros, kiu regis dum preskaŭ 30 jaroj.



EL LA KONGRESA PAROLADO DE ZAMENHOF  
1-a Kongreso en Bulonjo-sur-Maró (1905)



„Estim'ataj sinjorinoj kaj sinjoroj! — Mi salutas vin, karaj sam'ide'anoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tut'monda homa familio, kiuĵ kun-venis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj<sup>1</sup> de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas...”

„Ni kunvenis por montri al la mondo, kion la mondo, ĝis nun, ne volis kredi, ke reciproka komprenigado inter popoloj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu<sup>2</sup> aŭ en-glutu<sup>3</sup> la alian...”

„Kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...”

1. regno: lando; ŝtato/ 2. humila: serv'iste obeema/ 3. gluti: en-igi ion en la ventron tra la gorgo.

Post la fina batalo, la reĝino Tomiris plenigis felo-sakon je homa sango kaj sendis serĉi la korpon de Kiros inter la mortintoj. Kiam oni trovis ĝin, ŝi ordonis premi ties kapon en la felosakon. Tiel malhonor'ig'inte la mortinton, ŝi ek-parolis kaj diris al li:

„Kvankam mi venkis super vi, vi pere'igis min, ĉar vi per ruzeco, forrabis<sup>15</sup> mian filon. Tial, nun, mi satigas vin per sango, kiel mi promesis!”

Jen estas la plej ver'ŝajna historio pri la morto de Kiros.

Tradukis: G. Kurucz

1. soldat'aro/ 2. tiama popolo en Suda Azio/ 3. kun tre forta deziro/ 4. manĝi, trinki sen-mezure/ 5. fermenti: ĉi tie, iĝi acida vino el dolĉa suko de vin'beroj/ 6. sankta; ameg'ata/ 7. sciigo; informo al iu/ 8. humila: malfiera; obeema kiel servisto/ 9. la tuto de kondiĉoj/ 10. kateneno: ĉeno por ligi kaptitojn/ 11. barbara: ne-kultur'ita (laŭ la opinio de alia popolo aŭ homo)/ 12. sin kaŝi antaŭ iu; serĉi ŝirm'ejon kontraŭ io aŭ iu/ 13. fina kaj decida/ 14. falis kaj mortis en batalo/ 15. rabi: per-forte for-preni.

1. goja labor'emo; forta emo al io/ 2. interrilato/ 3. nazio: homo, kiu sekvis la ideojn de Hitler/ 4. neniigis/ 5. for-prenis de iu(j) ion malpermes'itan/ 6. estr'ino de organizo/ 7. ĉi tie: sen malfacilaĵoj; sen problemoj/ 8. havas devon pagi aŭ memori pri iu, kiu laboris por ni ĉiuj.

## PAROL'TURNOJ — DIR'MANIEROJ

*Havi iom da vaporo en la kapo* (esti ebrieta pro vino)

*Vino lin knokaŭtis*<sup>1</sup> (esti ebriega; perdi la konscion pro vino)

*Skribi kiel kokino* (skribi malbel'ege kaj ne-leg'eble)

*Leviĝis vento* (ek-ventis)

*Mono ĵet'ita en maron* (tute sen-utila el-spezo)

*Havi mil kaj unu zorgojn* (esti tro okup'ita; havi multan laboron)

*Krokodili* (paroli en nacia lingvo inter esperantistoj)

*Rompi la kapon* (pensi por diveni ion; pensi por solvi malfacilan taskon)

1. knokaŭti: sur-ter'igi iun per forta bato.



JUNULARA ESPERANTO-MOVADO EK-DE

# 40 JAROJ

Mi ne volas rakonti pri 40 jaroj de la junul'ara Esperanto-movado, sed nur pri la 10 unuaj, dum kiuj mi estis la ĉef-per-ant'ino por Francio.

Ĉio komenciĝis per la aperigo de *LA JUNA VIVO*, gazeto por ge-junuloj (1934). Nederlandaj ge-sinjoroj *van Veenendaal* redaktis ĝin. Kiel instruistoj, ili spertis, ke Esperanto estas la plej taŭga rimedo por inter-proksim'igi junulojn. De jaro al jaro, *LA JUNA VIVO* iĝis pli kaj pli kon'ata, precipe en Eŭropo.

Komence, gesinjoroj *van Veenendaal* organizis aŭtobusajn vojaĝojn tra Nederlando kaj, poste, al ekster-lando (Francio, Svislando). La ekskursoj estis sukcesaj.

En la jaro 1938, la instruista paro ek-havis la ideon okazigi Internacian Junularan Kun-venon (IJK) en la urbeto *Groet*, norde de *Amsterdamo*, ĉe la mar'bordo.

La Kunvenon partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj el dek najbaraj landoj. Mi neniam forgesos la entuziasmon<sup>1</sup> de la junularo. La

provo montriĝis plen'sukcesa. La ĉeest'antoj decidis fondi novan organizaĵon: *Tut'monda Junular-Organizo (TJO)*.

Al la 2-a IJK, kiu okazis en *Tervueren* (apud *Bruselo*), en aŭgusto 1939, al-iĝis 400 junuloj, kaj la Kunveno estis ankoraŭ pli sukcesa ol la unua, malgraŭ la militaj minacoj.

Kontakto<sup>2</sup> kun eksterlando kaj la el-donado de LA JUNA VIVO daŭris ĝis marto 1941. Post la germana okupo, la nazioj<sup>3</sup> detruis<sup>4</sup> la centran organizaĵon, kaj konfiskis<sup>5</sup> la posedaĵon de TJO.

Fine de 1945, LA JUNA VIVO re-aperis en modesta formo (vidu ĝian foton sube). Dum aŭgusto 1946, en *Blankenberge* (Belgio) kun-venis TJO-anoj por re-organizi la movadon. Venis junuloj el Britio, Belgio, Francio, Nederlando kaj Svedio.

De 1947, oni denove okazigis IJK-ojn, la unuan en *Ipswich* (Britio), kie sinjorino *van Veenendaal* iĝis Honora Prezidantino<sup>6</sup>.

Dum la sekv'intaj jaroj, ne ĉio iris glate<sup>7</sup> por TJO.

En 1952, TJO fariĝis *TEJO* (*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*), kaj en *L'Aquila* (Italio) ŝanĝiĝis ĝia Regularo. Poste, *TEJO* al-iĝis al *UEA* (Universala Esperanto-Asocio).


Tiuj, kiuj tra-vivis la unuajn jarojn, neniam forgesos pri *Groet* kaj *Tervueren*. Gesinjoroj *van Veenendaal* estis tre sin-donaj por la junularo. Ni ŝuldas<sup>8</sup> al ili la komencon de la junulara Esperanto-movado.

*S-ino M. Turin* (Francio)

DECEMBRO 1948

DEK UNUA JARO/No. 132

# LA JUNA VIVO



**ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ,  
KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO**

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

## KIOM DA VORTOJ VI KONAS?

### Anagramoj

Kio estas *anagramo*? Anagramo estas ludo per literoj. Se ni prenas, ekzemple, la vorton ANAGRAMO, ni povas re-konstrui per ĝiaj literoj aliajn vortojn: MANA AGRO. Kiel vi vidas, oni devas uzi ĉiujn literojn sen-manke.

Se la ludo plaĉas al vi, amuzu vin per la subaj vortoj, tio estas: faru el ĉiu el ili anagramojn!

LONGA	RIDI	KORO
KOLO	MONO	DORMI
BRAKO	MATENO	TREMO
TELERO	KNABO	GRAFO
MIZERO	PORKO	NEGRO
RONDO	VITRO	TUBERO

Sendu al la redaktisto (G. Kurucz; Hitel u. 10. fszt. 16.; H—6000 KECSKEMET; *Hungario*) viajn anagramojn, kaj provu el-pensi kelkajn similajn! La plej bonaj anagramoj aperos en iu proksima numero de JUNA AMIKO.

### Al-donu komencan literon!

Jen estas alia ludo per literoj. Malsupre, vi trovas vicojn da vortoj. Se vi al-metas, ĉe la komenco, iun literon, ek-estas tute alia vorto, kiel ekzemple el AVO iĝas PAVO aŭ KAVO. Ĉu vi trovas la necesajn literojn? Sendu vian vorto-ĉenon al la redaktisto kaj, se vi havas similajn vorto-parojn, sendu ilin kune kun la solvo!

ARBO	KULO	AŬTO
ESPERO	SOCIO	RANO
ARTO	AŬ	SENCO
LAŬDO	LASTA	AVENO
VENTO	PLAUDI	FENDI
REMI	RETO	ARMĪ

Solvoj aperos en la ven'onta numero.


G. Kurucz (:kuruc)

1. fabelo, kies roluloj estas bestoj/ 2. malgranda griza birdeto; ĝi loĝas en la proksimo de domoj/ 3. nigra-blanka utila rapid'fluga birdeto/ 4. birda loĝejo/ 5. malfermaĵo/ 6. birde kanti/ 7. birde krii/ 8. birda buŝo.



## LEV TOLSTOJ

Antaŭ 150 jaroj, naskiĝis Lev Nikolajeviĉ Tolstoj, el-stara verkisto de la monda literaturo. Liaj verkoj grave efikis sur multajn rusajn kaj ekster-landajn artistojn. Por memori pri li, ni prezentas mallongan fablon<sup>1</sup> el lia por-infana literatura verkaro.



## PASERO<sup>2</sup> KAJ HIRUNDOJ<sup>3</sup>

Iu-foje, mi staris en la korto, kaj rigardis al hirunda nesto<sup>4</sup>, kiu troviĝis sub la de-flu'ejo.

Mi staris kaj vidis la ge-hirundojn el-flugi. Ilia nesto restis malplena.

Dum la hirundoj for-estis, pasero al-flugis de la tegmento al la nesto. Ĝi ĉirkaŭ-rigardis, ĝoje batadis per la flugiloj, kaj eniris tra la aperturo<sup>5</sup>. Tuj poste, la pasero el-sovis la kapon kaj komencis pepadi<sup>6</sup>.

Unu el la hirundoj baldaŭ re-venis. Ĝi en-sovis la kapon en la neston, sed rimark'inte la „gaston“, ĝi subite kriĉis<sup>7</sup>, flug'pendis momenton antaŭ ol malaperi.

La pasero restis en la nesto, kaj plue pepadis.

Post kelka tempo, al-venis aro da hirundoj. Ili flugis rekte al la nesto, kvazaŭ ĉiu el ili volus rigardi la „gaston“. La hirundoj ne restis longe. Ili for-flugis.

*La pasero ne timis, ĝi vigle turnadis la kapon kaj pepis sen-ĉese. Subite la hirundoj re-aperis. Ili faris ion ĉe la nesto, kaj forflugis rapide.*

*La hirundoj forestis ne sen celo. Ĉiu el ili portis koto-pec'eton en la beko<sup>8</sup>, kaj pacience komencis fermi la aperturon de la nesto.*

*Ili forflugis kaj re-flugis, denove al-portis kotopecetojn, kaj la aperturo iĝis pli kaj pli malgranda.*


*Dum kelka tempo, ankoraŭ vidiĝis la kolo de la pasero, poste nur la kapo, poste nur la beko, kaj fine — nenio: la hirundoj tute en-fermis ĝin.*

*Fin'inte sian laboron, la hirundoj ĉirkaŭ-flugadis super la domo, kaj pepis trankvile.*

Laŭ ALBERTO FERNANDEZ (Belgio)

## PRI LA SEKRETAJ „FLUG'ANTAJ TELEROJ”

(Daŭrigo sur la 16-a paĝo!)



„*Flugantaj teleroj*”, aŭ per fak’vorto *nifoj* — pri kiuj amasiĝis dek-miloj da diversaj raporto<sup>1</sup> — vekas mokan rideton en la publiko kaj eĉ en multaj sciencistoj. Oni konsideras la nifo-fenomenon<sup>2</sup> kiel fantaziaĵon<sup>3</sup> aŭ halucinon<sup>4</sup>.

Kelkaj verkistoj, sen-dube, ekspluat<sup>5</sup> la fenomenon kun tro granda kaj sen-brida<sup>6</sup> fantazio. Ili sen-ĝene miksis faktojn kun fikcioj<sup>7</sup>, kaj tiel ili mis-kreditig<sup>8</sup> la tutan nifo-fenomenon.

Kiel do statas la afero? Ĉio komenciĝis la 24-an de julio 1947, kiam *Arnold Kenneth*, juna Uson’ano, kiu flugis per sia aviadilo, rimarkis 9 brilajn diskojn<sup>9</sup>. Ili moviĝis tre strange: kiel for-jet’ita plata ŝtoneto sur akvo-supraĵo. Li donis al ili la nomon „*teleroj*”.

Laŭ historiaj paperaĵoj, la nifoj aperadas en nia ĉirkaŭaĵo ne de 1947, sed de antaŭ jar’centoj. Parolas pri tio skribaj re-memoraĵoj jam el la 16-a jarcento.

Kian formon havas la nifoj? Ili tre diferencas laŭ formo kaj grandeco. Ekzistas formoj de teleroj, globoj, ringoj, ovoĵ, kaskoj<sup>10</sup> k. t. p. Ankaŭ laŭ grandeco, ili tre varias<sup>11</sup>. Ekde la grandeco de pied’pilko ĝis 300 metrojn longa cigaro<sup>12</sup>.

Kian impreson<sup>13</sup> faris la nifoj sur rigard’antoj? Ni citas<sup>14</sup> el la rakonto de Usona lernejestro. La renkonto okazis la 17-an de aprilo 1967, nokte, ki-

am li venis hejmen per sia aŭtomobilo.

„*Subite, mi rimarkis lum-aĵon super la monteto. Mi mal-rapidigis la aŭton. La grandega objekto, ver’sajne, pli ol 90 metrojn longa, restis super mi sen-mova, dum sekundero*<sup>15</sup>, kvazaŭ por ŝanĝi sian direkton. Ĝia lumo estis terur’ege forta. La tegmento de mia aŭto eĉ ne plu estis ŝirmilo kontraŭ tia lumego. Ne-kred’eble, tiel intensa<sup>16</sup> lumo! Kiam mi al-rigardis al miaj manoj, mi vidis ilin kvazaŭ foton jar’itan per X-radioj!”

Renkontiĝo kun nif’uloj estas malofta. Des pli interesa estas la aventuro<sup>17</sup>, kiun la finnoj *Aarno Heinonen* kaj *Esko Viljo* (36- kaj 38-jaraj) travivis la 7-an de januaro 1970.

Ili ambaŭ skiadis<sup>18</sup> en arbaro je 16 km de *Heimola* (130 km de *Helsinki*), kiam ĉirkaŭ la 16-a horo kaj 15 minutoj, ili decidis ripozi. Tiam aŭdiĝis zumado pli kaj pli laŭta. *Heinonen* rimarkis tre helan lumon en la ĉielo. La objekto, ĉirkaŭ 3 metrojn larĝa, proksimiĝis al la tero. Kiam ĝi troviĝis 4 metrojn dis-de la ter’supraĵo, la zumado haltis kaj la objekto sen-mov’iĝis. El ĝia centro, el-iris fortega lumo, kaj en ties mezo aperis estaĵo, ne pli ol 90 centimetrojn alta. Ĝi tenis, en la mano, nigran skatolon, el kiu subite el-iris lum’radio, preskaŭ blindiga<sup>19</sup>. Poste, la nifo, kune kun la est-

# ROMBO<sup>1</sup>

Ludo por 2 personoj

La apuda paĝo prezentas al vi cifero-platon, kiu konsistas el 12 romboj, numeritaj de 1 ĝis 12. La eksteraj pintoj estas kun-lig'itaj, dum la internaj pintoj estas ligitaj al la centra punkto *R*.

Ambaŭ lud'antoj disponas<sup>2</sup> pri 16 butonoj; tiuj de la unua ludanto estas, ekzemple, blankaj, kaj tiuj de la dua estas nigraj aŭ de alia koloro. Ĉiu ludanto, laŭ-vice, metas siajn butonojn sur la rombo-pintojn, kaj klopodas<sup>3</sup>, unu-flanke, okupi la 4 pintojn de iu rombo — oni nomas tion: „Fari rombon” — kaj, aliflanke, malhelpi la kontraŭ-ludanton fari same.


Kiam unu el la 2 ludantoj sukcesis „fari rombon”, li for-prenas unu butonon de la kontraŭludanto, kaj elektas laŭ-eble tian, kiu malhelpas lin fari novan rombon, aŭ kiu ebligas al la partnero<sup>4</sup> fari tian — escepte<sup>5</sup> de la butonoj, kiuj jam formas ferm'itan rombon. Tiuj ludo-reguloj estas iel kompar'ebraj al tiuj de la muelilo-ludo, kon'ata en multaj landoj.

Kiam ambaŭ ludantoj de-metis ĉiujn siajn po 16 butonojn en la ludon, ili movas, laŭ-vice, po unu butonon de iu punkto al alia libera, por „fari rombon” kiel eble plej ofte, kaj ankaŭ por forpreni butonojn de la kontraŭludanto. Tiu-cele, estas permesate utiligi, por la movoj, ankaŭ la centran punkton *R* (escepte en la komenco de la ludo, dum la sur-metado de la butonoj), sed oni devas ĝin for-lasi je la sekva movo.

Kiam unu ludanto havas nur 3 butonojn, li ne plu povas „fari rombon”, kaj li do perdis la ludo-batalon.

A. Lienhardt (Francio)

1. kvadrato prem'ita, ne rekt'angula/ 2. havas en sia posedo/ 3. volas; intencas; celas/ 4. persono, kun



aŭ kontraŭ kiu iu ludas/ 5. ĉiam jes, sed en tiu okazo — ne; krom.

# KASTORA LETERO

## De J. H. SULLIVAN

*Miaj karaj Kastoroj!*

Mi bedaŭras, se ĉi tiu Letero estas iom malpli longa ol kutime, ĉar mi havas tiom da laboro, ke foje mankas la tempo fari aferojn, kiujn mi volas fari. La kialo estas, ke mi nun faras kurson de unuversitato<sup>1</sup> kaj, kompreneble, tio signifas, ke mi devas multe studi. Ĝis nun, mi sukcesis fari miajn diversajn laborojn por Esperanto, kaj esperas ilin daŭrigi. Tamen, de tempo al tempo, mi ne povas fari ilin ĝuste tiam, kiam mi volas. Sciu, tamen ke se mi ricevos de vi, aŭ de via instruisto, ateston pri plenumo de kondiĉoj por esti Kastoreto, aŭ por atingi pli altan gradon, mi ĉiam sendos, kiel eble plej baldaŭ, vian atestilon, kaj eventuale<sup>2</sup> vian insignon. Bon'volu noti, tamen, ke la atestilojn mi povas sendi en ferm'ita koverto nur, se vi sendas al mi internacian respond'kuponon<sup>3</sup>. (Via instruisto informos vin, ĉu tiuj estas hav'eblaj en via lando, kaj kiel akiri ilin.)

### AL. NE-KASTOROJ

Ĉar lasta-tempe mi ne klarigis al ne-membroj, kiel ili povas an'iĝi al la KASTORA KLUBO de ESPERANTO, nun mi donas, al ili, tiun informon.

Membreco estas sen-paga, sed por esti membro vi devas lerni kaj parkere<sup>4</sup> ripeti al via Esperanto-instruisto, ĉi tiun tri-opan promeson:

„Mi promesas diligente lerni Esperanton”;

„Mi promesas ĉiam porti la verdan stelon”;

„Mi promesas ĉiam konsideri ĉiun alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso<sup>5</sup>, koloro aŭ kredo li estas”.

Kiam vi faros tion, petu vian instruiston de Esperanto skribi al la Ĉefa Kastoro (adreso en la fino de tiu ĉi letero), kaj certigi, ke vi bone ripetis la promeson, kaj komprenas ĝian signifon. Li devas doni (a) vian familian nomon; (b) vian personan nomon; (c) vian adreson; (ĉ) ĉu vi estas knabo aŭ knabino; (d) vian naskiĝ'daton. Poste, vi ricevos atestilon pri membreco, en la komenca rango de Kastoreto. Vi certe ne dezirus resti longe en tiu malalta rango, kaj vi ne rajtas resti Kastoreto dum pli ol unu jaro. Kiam vi fariĝos Kastoreto,

mi sendos al vi informon pri tio, kiel atingi pli altan gradon.

(INSTRUISTOJ: Se vi deziras, ke viaj ge-lernantoj fariĝu Kastoroj, skribu al mi por plenaj informoj!)

### NIAJ PROMOCIITOJ

Jen plua listo<sup>6</sup> de Kastoroj, kiuj atingis pli altan rangon en la Klubo (ĝis la komenco de septembro):

#### FARIĜIS BRUNAJ KASTOROJ:

- 837 GÖLLNER, Bettina (FR Germanio)  
839 RODE, Kerstin (FR Germanio)  
840 SIEMER, Anke (FR Germanio)  
841 ZANDER, Torsten (FR Germanio)

#### FARIĜIS ARGENTAJ KASTOROJ:

- 658 SZUMLANSKA, Barbara (Pollando)  
663 MURAWEL, Dorota (Pollando)  
668 NAZAROWICZ, Wodzimierz (Pollando)

Fine... jen estas la adreso de la Klubo: 3 Berwick Avenue, URMSTON, Manchester, M31 1PS, *Anglio*.

1. centro de supera instruado/ 2. en okazo de bezono/ 3. papero, kiu rajtigas la ricev'inton ricevi poŝtmarkon por sendi leteron en alian landon/ 4. diri laŭ-vorte, sen legi en libro aŭ sur papero/ 5. ĉiuj homoj de unu pra-familio/ 6. aro da nomoj, da prezoj k. t. p.



#### LA RUBRIKON<sup>1</sup> GVIDAS

Josef Chvosta (ĥvosta)

Engelsova 289,

290 01 PODEBRADY

*Ĉeĥoslovakio*

Sendu ĉiun korespondadon rekte al tiu adreso!

- Pluraj novaj leg'antoj petis, ke la redakt'ist'aro denove konigu la regulojn de la Klubo (ĝi aperis antaŭ 5 jaroj). Ni volonte plenumas ilian deziron.
- Por teni kontakton<sup>2</sup> kun niaj legantoj (ĝis-17-jaraj), la redaktistaro invitas la abon'antojn fondi *Klubon de Legantoj de Juna Amiko (KJA)*.

KJA havas la celon, unuflanke, kun-teni junajn esperantistojn; aliflanke, inter-ligi opajn grupojn kun aliaj grupoj kaj kun la redaktistaro.

4 ĝis 10 geknaboj el la sama urbo aŭ vilaĝo fondas unu KJA (en ĉiu urbo, eĉ lernejo, povas funkcii pluraj KJA!). La klubanoj elektas sekretarion<sup>3</sup> kaj aliajn funkci'ulojn laŭ-plaĉe.

Post la fondo de KJA, la sekretario skribas sian unuan raporton al la rubrik'estro (adreso supre).

Ĉiu KJA elektas por si apartan nomon (ekzemple: Verda stelo, Gajaj junuloj, Kuraĝaj Kastoroj k. t. p.).

Post la unua raporto, la KJA ricevas sian numeron kaj pliajn informojn. En la sekvaj raportoj (du-on'jaraj), la sekretario devas uzi tiun numeron.

La klubanoj povas peti helpon de plen'ag'uloj.

Jen, vi vidas, ke la reguloj estas facile plenum'eblaj. Ni esperas, ke baldaŭ fondiĝos novaj Kluboj!

● Tamen la rubriko estas ne nur por la klubanoj, sed por ĉiuj, kiuj legas la revuon, kaj kiuj interesiĝas pri konkursoj. Partoprenu do en la konkursoj, kaj skribu

ofte! Ĉiu ricevos belan vidaj'karton en la respondo.

● Tiuj ĉi asertoj<sup>4</sup>, el diversaj fakoj, estas ne-ĝustaj. Ĝustigu la erarojn!

— Francio, Britio, Italio, Japanio kaj Hispanio apartenas al gravaj Eŭropaj ŝtatoj.

— Universala Esperanto-Asocio (mallonge UEA) estas organizo de Krist'anaj esperantistoj.

— Geedzoj Curie (:kirii) studis la problemojn de astronomio.

— En Suda Ameriko situas<sup>5</sup>, inter-alie, la ŝtatoj: Bolivio, Brazilo, Libio, Argentino, Urugvajo.

— La islam'anoj<sup>6</sup> kalkulas la jarojn ek-de la naskiĝo de Mahometo, kiu okazis en 1492.

1. parto, angulo en gazeto/ 2. kontakto: inter-ligo/ 3. ĉefa afer'gvid'anto; estro/ 4. konstatoj, kiujn la parolanto trovas veraj/ 5. kuŝas; troviĝas/ 6. islama: religio fond'ita de Mahometo/

#### *(Daŭrigo de la 11-a paĝo)*

ajo, malaperis en luma nubaj. Ambaŭ ski'antoj multe suferis post tiu renkonto. Ili havis vomemon<sup>20</sup> kaj kap'doloron. La sango-premo tute malalt'iĝis, la sento pri egal'pezo preskaŭ perdiĝis, ĉe ili.

De kie venas la nifoj? Ĉu ili estas nura fantaziaĵo de malsanaj cerboj? Tre verŝajne, ne.

Eble, ili estas produktoj de estaĵoj sur alta grado de scienco, kiun ni apenaŭ povas imagi.

Ŝajnas, ke iuj ekster-teraj estaĵoj observas<sup>21</sup> nin ek-de jarcentoj, tamen ankoraŭ ekzistas multaj duboj pri tio.

Adaptis G. Kurucz laŭ la artikolo de „Heroldo de Esperanto” (n-ro 1623)

1. raportoj: voĉe aŭ skribe sciigi iun, pri kio oni sciigis/ 2. fenomeno: aperaĵo; okazaĵo/ 3. fantazio: bildo, kiu ekzistas nur en la imago/ 4. halucino: malsana sento, kiu ne havas bazon en reala vivo/ 5. fruktuzis ion/ 6. bridis: moderigi; re-teni ion; ne lasi ion libera/ 7. fikcio: el-pens'aĵo ne-vera/ 8. havigis al io malfidon/ 9. ronda plataĵo/ 10. ĉapo el metalo/ 11. havas grandajn diferencojn/ 12. volvaĵo el sek'iĝitaj tabak'folioj/ 13. impresoj: efiko sur la sentojn/ 14. sen-ŝanĝe ripetas ies vortojn/ 15. sekundo: 60-ono de minuto/ 16. forta; ega/ 17. ne-ordinara tra-vivaĵo/ 18. skii: gliti sur neĝo per specialaj longaj mallarĝaj tabuloj/ 19. blinda: ne-kapabla vidi/ 20. vomis: el-igi mang'aĵon el la ventro tra la buŝo/ 21. atentis; atente sekvas.

# PAĜO DE KOMENCANTOJ



EVA KUIRAS SUPON  
(Ekzerco por rekta objekto<sup>1</sup>)



Eva brul'igas gason.

Eva prenas kaserolon<sup>2</sup> kaj verŝas, en ĝin, iom da oleo.



Ŝi varm'igas la oleon.

Ŝi en-ŝutas pizon<sup>3</sup>.  
Ŝi kirlas<sup>4</sup> la pizon.



Eva verŝas akvon en la kaserolon.



Ŝi al-donas karon<sup>5</sup> kaj petroselon<sup>6</sup>.

Ŝi kovras la kaserolon kaj kuiras la supon, dum unu horo.



Eva ploras. Ŝia kuir-aĵo gustas al nenfu. Kial ne?

Kion ŝi forgesis?

(uodns a u e u on en la supno.)  
-sa (Ŝi forgesis meti sa-

Ludmila Jevsejeva.

## LA KUIRISTO

Dank' al volo kaj persisto!  
mi fariĝos kuiristo.

Jen karoto\*,  
beto, rapo,  
celerio,  
blanka napo.

Jen ter'pomo  
kaj brasiko,  
petroselo  
kaj papriko,

salo, pipro  
kaj mustardo,  
roz'kolora pec'  
de lardo<sup>2</sup>,

bulbo... ne-e! Mi ĝin ne tuŝos,  
ĉar okuloj tuj ek-duŝos<sup>3</sup>.



1. vorto, fraz'ero, kiu respondas pri kiu, kion/ 2. vazo por kuirado/ 3. speco de legomo: malgrandaj verdaj globetoj/ 4. movi per kulero en ĉiu direkto/ 5. helruĝa beto/ 6. blanka beto.

1. daŭra el-teno pri iu decido/ 2. porkaĵo; dika grasa tavolo sub la felo/ 3. duŝi: dis-verŝi akvon tra tru'etoj/ \* serĉu ŝlin en vortaro.





# enigmo

POR KORESPOND'EM'ULOJ

La plum'amikoj de Maria fetas siajn leterojn en tiajn leter'kestojn. Kie ili loĝas?

Sendu vian solvon al s-ro Dieter Berndt, Berolinastr. 2.; DDR-102 BERLIN, antaŭ la 15-a de aprilo 1979.

La ĝusta solvo aperos en la venonta numero.


**ABC**  
POR KOMENCANTOJ

# interesaj


## URBO SUB SABLO

Ses-membra Usona grupo de arkeologoj<sup>1</sup> opinias ke, ĉe la en-fluejo de Nilo, troviĝas urbo sub la sablo. Elektronaj<sup>2</sup> instrumentoj<sup>3</sup> venigis ilin al tiu ĉi supozo<sup>4</sup>.

En tiu loko, multaj malnov'egaj medaloj<sup>5</sup> kaj romp'it'ajoj de argilaj<sup>6</sup> vazoj estas el-fos'itaj; kelkaj el ili dat'iĝas el la 4-a jar'cento a.Kr.<sup>7</sup> El-ter-iĝis ankaŭ teniloj de kruĉegoj<sup>8</sup> por vino el la insulo Rodos, kaj vestopecoj el Italio kaj Proksima Azio. (Volksstimme)



1. arkeologo: sciencisto, kiu studas objektojn de pra-uloj/ 2. funkci'anta dank' al elektronoj/ 3. mezurilo, plej ofte ne-simpla/ 4. opinio ankoraŭ ne pruv'ita science/ 5. metala disko kun ornamaj bildoj, kiel sur mon'eroj, ekzemple/ 6. argilo: flava tero, taŭga por poto-farado/ 7. antaŭ Kristo/ 8. alta argila vazo kun dika ventro/ 9. ruĝa suko-plena legomo glob'forma/ 10. neprofesia/ 11. fortika: forte kontraŭ-stara al eksteraj difektoj/ 12. kun-igi du divers'specajn branĉojn por unuigi iliajn ecojn.



## SUBE TER'POMO — SUPRE TOMATO<sup>9</sup>

Amatora<sup>10</sup> gardenisto Pilipp Völker (Germanio F. R.) sukcesis samtempe rikolti, de la sama planto, ter'pomon sub la tero, kaj tomaton super ĝi.

P. Völker plantis terpomon en poto. Kiam la trunk'eto de la terpomujo fortikiĝis<sup>11</sup> (li restigis nur unu trunketon), li prenis plantidon de tomato (ankaŭ ĝi kreskis kaj fortikiĝis en poto), kaj inokulis<sup>12</sup> ĝin al la terpomujo. La nova kreaĵo — ni nomu ĝin „terpomat'ujo” (=terpom/o-to/mat'ujo) — maturigis kaj ruĝajn tomatojn, kaj bon'gustajn terpomojn. (Frankfurter Rundschau)

# KANTU!

## Maruša, kisu min...

*Ĉeĥa popola kanto*

Ĉi - uj kna - boj kaj kna - bi - noj a - mas sin,  
nur ne - ni - u ju - nu - le - to a - mas min.  
Ma - ru - ŝa, ki - su min, sen pe - to al pa - trin'  
ŝi ju - na sa - me fa - ris, pri ki - soj ne a - va - ris.

Batas panjo, batas panjo, batas  
min,  
ke mi amas, ke mi kisas, knabo,  
vin.  
Maruša, kisu min...

Sidas panjo, sidas panjo sur  
kort'et',  
kaj mi estas en kamero  
kun knabet'.  
Maruša, kisu min...

**SE VI ESTAS KONTENTA PRI NIA REVUO,  
ABONU AL JUNA AMIKO POR 1979!**

# PIONIRO<sup>1</sup> DE LA HOMA KULTURO

## Paracelsus 1493—1541



Paracelsus naskiĝis la 17-an de decembro 1493 en Svislando. Dum jaroj, li faris vizitojn en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo, kaj re-venis al sia patrio kiel fama majstro<sup>2</sup> de la kurac'arto. De 1525, li instruis en la universitato<sup>3</sup> de Bazel.

Paracelsus kuraĝe batalis kontraŭ la tabuoj<sup>4</sup> de la mez'epoka kuracado, kaj urĝigis la studadon de la naturaj leĝoj. Lia opinie, la malsanoj de-venas de kemiaj perturboj<sup>5</sup> en la korpo. Li konsideris la medicinon<sup>6</sup> kiel la plej gravan branĉon de la scienco; kaj pri la kemio, li havis opinion, laŭ kiu la celo de kemio ne estas trovi la manieron de or'farado (kiel opiniis la alkemiistoj de la mezepoko), sed produkti medikamentojn<sup>7</sup>. Li mem faris medikamentojn el multaj diversaj plantoj.

Paracelsus estas la fond'into de la moderna<sup>8</sup> medicino. Liaj instruoj malfermis, sia-tempe, novan vojon por tiu grava scienco-branĉo.

Li mortis en Salzburg (:zalcburg) en la jaro 1541.

1. ĉi tie: homo, kiu pretigas la vojon al nova ideo/ 2. specialisto lerta kaj el-stara en sia fako/ 3. la plej alt'grada lernejo/ 4. tabuo: temo, objekto aŭ vivulo ne-tuŝ'ebla sen puno/ 5. perturbo: malordo en la funkciado de io/ 6. medicino: kurac'arto/ 7. re-san'ig'ilo; kuracilo/ 8. nun-tempa.

# KIEL ABONI AL JUNA AMIKO?

AŬSTRIO — *Rudolf Novák GmbH*; Köllnerhofgasse 4.; A—1011 WIEN I.

AŬSTRALIO — *Globe Hungarian Bookshop* 694-696 George St. SYDNEY, NSW 200.

BRAZILO — *Livraria D.Landy Ltda.*; Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943; 01000 SAO PAULO.

BRITIO — *The Danubius Books Company* 58; Chatsworth Road; LONDON NW2 4DD.

DANLANDO — *Hunnia Books and Music*; Norrebrogade 182. I. tv. KOBENHAVN.

FINNLANDO — *Akateeminen Kirjakauppa*; Keskuskatu 2.; SF—00100 HELSINKI 10.

FRANCIO — *Société Balaton*; 12 Rue de la Grande Bataliere; PARIS 9.

G. F. R. — *Ujvári-Griff*; 8000 MÜNCHEN 81; Titurelstr. 2.; Harry Münchberg, Wissenschaftliche Versandbuchhandlung, Postfach 3394 Langelsheim 2.

ISRAELO — *Publika biblioteko Hadash*, Nesz Ciona u. 4.; TEL AVIV; Gondos Sándor, Haifa, Herzl 10, Beth Hakranot.

JUGOSLAVIO — *Forum*, Vojvode Misica broj 1.; NOVI SAD.

KANADO — *Délibáb Film and Record Studio*, 19. Prince Arthur Street West, MONTREAL 130. Que.; *Pannonia Books*, P. Box 1017, Postal Station „B” TORONTO, Ont.

NEDERLANDO — *Club Qualiton*, Prinsenstraat 26, AMSTERDAM.

SVEDIO — *A. B. Nordiska Bokhandeln*, Alströmergatan 22, 101 10 STOCKHOLM 1.

SVISLANDO — *Metropolitan Verlag*, Szerday Sándor, Teichweg 16, CH—4142 MÜNCHENSTEIN.

USONO — *Center of Hungarian Literature*, 4418—16 Ave. Brooklyn N. Y. 11204; *Hungarian Books and Records*, 11802 Buckeye Road, Cleveland, OHIO 44120.

VENEZUELO — *Luis Tarcsay*, Calle Iglesia Ed. Villoria, Apt. 21—105. C. 24. CARACAS.

Abonojn el la ceteraj landoj akceptas UEA (*Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002*) kaj KULTŪRA (*BUDAPEST, Pf. 149. 1389*) — al la ĉekkonto 027 024/7, Hungara Nacia Banko, Budapest, 1850.

En socialismaj landoj oni povas aboni al la revuo ĉe ĉiuj poŝtoŝefoj (menciu la indeks-numeron de la revuo) aŭ ĉe la koncernaj asocioj.

● 15-jara litova lernantino volas trovi sincerajn geamikojn en la tuta mondo. Ŝi interesiĝas pri moderna muziko, kolektas kolorajn bildkartojn, fotojn de geaktoroj. Ŝia adreso *Vilija Straznickaite*; Topoliu 4-41; 234580-ALYTUS; Litovio, USSR.

● 14-jara knabo deziras korespondi kun eksterlandanoj. Skribu al: *Andrej Lunjov*; str. Matrosova 9-b, 73; 660064 KRASNOJARSK; USSR. Li kolektas poŝtmarkojn kaj insignojn.

● *Daniela Kolarova*, 12-jara komencantino deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj. Ŝia adreso: str. Nikola Iliev 53; 5500 LOVEC; Bulgario.

● 16-jara lernantino deziras korespondi pri sporto kaj muziko. Leterojn adresu al *Stoma Natalija*; str. Totmina 15-66; 660113 KRASNOJARSK; USSR.

● 14-jara lernantino serĉas eksterŭropajn leteramikojn 14- ĝis



16-jarajn. Leterojn adresu al: *Maret Linke*; Wallensteinstr. 1; DDR-25 ROSTOCK 1; Germana DR.

● 16-jara lernantino volas korespondi pri literaturo kaj muziko. Ŝi kolektas insignojn kaj diskojn. Ŝia adreso: *Marina Parŝukova*; str. 5-ja Prodolnaja 57; 660056 KRASNOJARSK; USSR.

● Dek sovetaĝaj gejunuloj serĉas junajn leteramikojn en la tuta mondo. Leterojn sendu al la adreso de f-ino *Olja Panova*; poŝtkesto 684; 665806 ANGARSK; USSR.

SOLVO por la letero de X. Y. (n-ro: 14)

*Karaj kamaradoj! Mi sendas al vi ĉiuj elkoran saluton el mia feria vojaĝo. Mi aĉetis la plej belan bildkarton, kiu montras al vi la urbĉon, kie mi loĝis dum unu semajno. La tiean kastelon super la urbo mi vidis. Krome, proksime estas tre konata sablo-ŝtona rokaro, kie mi ankaŭ vagis. Mi komencis tiun eĉ supren-grimpi per ŝnurego. Tiu sporto tre plaĉas al mi. Mi volas fondi hejme klubon de monto-grimpantoj.*

### JUNA AMIKO


Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H—1368 Budapeŝt 5. Pf. 193.). Responda eldonisto: TIBOR VASKO. Redaktoro: GÉZA KURUCZ. Kunlaborantoj: D. Berndt (GDR), M. Boulton (Anglio), J. Chvosta (Ĉeĥoslovakio), As. Grigorov (Bulgario), R. Grinŝpan (Sovetunio), V. Heimlich (Israelo), L. Jevsejeva (Sovetunio), E. Linz (Aŭstrio), R. Okumura (Japanio), s-ino Osz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), E. Raveloson (Madagaskaro), Z. Rehoviĉ (Jugoslavio), s-ino Saranath (Hinda Unio), T. Sekelĵ (Jugoslavio), J. H. Sullivan (Anglio), s-ino M. Turin (Francio), J. Zágoni (Rumanio), W. Zytynski (Pollando), Grafikistoj: J. Klement, P. Rak (Ĉeĥoslovakio), S. Plugor (Rumanio), s-ino E. Váli, Z. Vámos (Hungario). Lingva kontrolo: A. Lienhardt (Francio), A. Pechan (Hungario).

Kiadóĵ Főig. engedélyszáma:

Minisztertanács Táĵ. Hiv. — III. IFJ 30 1976.

MODERNAJ HUNDOJ




Du hundoj renkontiĝis en la dezerto! Unu salutis la alian:  
„Miaŭ!”  
„Ĉu vi frenezigiĝis? Kial vi miaŭas?” demandis la alia.  
„Mi lernas fremdan lingvon.”

GIS-OSTA ESPERANTISTO



„Mi gratulas. Knabo!”  
„Ĉu esperantisto?”



1. sen-pluva sabla vastaĵo/ 2. freneza: tia, ke li perdis la penso-kapablon.

BAGATELO

„Paĉjo, venu rapide! Petro eltrinkis botel'eton da inko. Kion fari nun?!”

„Faras nenion. Skribu per kraĵono!”